

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 7, nummer 2 (38) juli-augustus 2014

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 7, n-ro 2 (38): julio-aŭgusto 2014
Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

La somerferioj estas antaŭ la pordo. Denove dekmiloj da feriontoj forveturos suden por serĉi la sunon kaj la dolĉan nenifaradon: sunumi, naĝi, promeni, ripozi, fari kion oni volas aŭ tute nenion, senti sin tute libera, sen ĉefo kiu ordonas onin la reston de la jaro. Vivi en fremda, sed agrabla ĉirkaŭjo, kiu forgesigas al oni la kutiman rutinan vivon! La dolĉa vivo!

Aliaj ferias en sia propra lando. Multaj homoj ankaŭ tute ne forlasas sian domon, sed tamen pasas agrablan tempon hejme, konsciaj, ke hejme ili havas ĉion kion ili bezonas, kaj vizitas muzeojn, parkojn, belajn lokojn. Ankaŭ tio estas feriado, kiu valoras la penon.

Kion ajn vi intencas fari dum viaj ferioj, mi deziras al vi ĉiuj malstreĉan kaj ripozigan tempon. Mi tamen esperas, ke vi ankaŭ trovos tempon por legi nian revuon, kiu ankaŭ nun enhavas tre interesajn artikolojn.

Pieter Jan Doumen

Historio de Esperanto en Belgio(1)

Geschiedenis van het E-o in België (1)

1. La unua belga esperantisto

En majo 1892 la revuo *L'Annonce Timbrologique* (La Poŝtmarkologia Avizo), 3-a jarkolekto, n-ro 27-a, raportas mallonge kaj favore pri valupukaj kursoj en Lieĝo kaj Vervierso. La kurso de Lieĝo okazis en la Poliglota Cerclo. La raporto estis subskribita de la direktoro de la gazeto, Armand Dethier.

En la 4-a kolekto, n-ro 40-a de junio 1893, aperas la unua mencio pri Esperanto en artikoleto, kiu klare montras la interesigon de Dethier pri internaciaj lingvoj. Tradukita en Esperanto, ĝi tekstas :

"La antaŭa numero de la *Gazette Timbrologique*, en tre bone verkita artikolo de S-ro de Beaufront, tre forte propagandas novan uni-

versalan lingvon, Esperanton, fonditan en 1887 de la rusa doktoro Zamenhof. Baldaŭ oni ne plu kapablos nombri la universalajn lingvojn ekster Volapuko, kiu estas tute viva, malgraŭ la esprimita dubo de la *Courrier des Timbres-Poste* (la Heroldo de la Poŝtmarkoj), ekster la novigita latina, antaŭe tre kara al pastro Poncin, ni konigis al niaj legantoj en decembro 1891 la ekziston de Mondolico kaj de ĝia revuo *Miso Tempo*, eldonita en Harlema".

"Jen nun Esperanto, kiu intencas ŝakmatigi ĉiujn siajn antaŭulojn, kaj, se ĉio kion proklamas S-ro de Beaufront estas vera, diable povus sukcesi.

"Aŭskultu nur ! La gramatiko konsistas el 16 reguloj, kiuj ne havas esceptojn, kaj ĝia vortaro entute teniĝas en broŝuro, kiun oni vendas je 10 cendoj!



Gesinjoroj Zamenhof kun (de maldekstre) Aleksandro, Henriko kaj Leono Zamenhof en Dresdno (1908)

"Plie, krom la lernolibro ekzistas malgranda folio, kiun oni povas facile aldoni al letero, nun tradukita en ĉiujn grandajn eŭropajn lingvojn, kaj kiuj ebligas onin tuj komprenigi sin de iu ajn fremdlingvano.

"Se oni skribas en Esperanto al svedo ekzemple, kaj oni aldonus al sia letero la svedan eldonon de la malgranda folio, oni povus ricevi respondon en la nova lingvo ! Tiel facile lernebla ĝi estas !

"Tiu rezultato, se ĝi pruvigis vera, estus sendube bonega. Cetere tio estas facile kontrolebla, kaj la filatelistoj certe ne hezitus oferti dek cendojn por lerni lingvon, kiu tiel favore plifaciligus iliajn interŝanĝrilatojn." (Fino de la citaĵo)

Dethier ne kontentiĝis per tio, sed vere aktive mem studis la lingvon. Tion li ankaŭ sciigas per artikoleto en sia revuo en septembro 1893 (4-a jarkolekto, n-ro 43-a). Ni citu :

"Antaŭ iom da tempo ni parolis pri Esperanto, tiu nova internacia lingvo, kreita de D-ro

Zamenhof de Varsovio, kaj konsideris ĝin forta helpilo, kiu povus grave plifaciligi la interŝanĝoj de kolektantoj.

"Ekde tiam ni lernis la lingvon, konkuranton de Volapuko, kaj ni rekonis, ke la propagandistoj de Esperanto ne troigas, se ili proklamas ĝin miriga pro ĝia simpleco.

"Unu el la plej bonaj pruvoj de ĝia supereco rilate al la aliaj artefaritaj lingvoj montriĝas per la fakto, ke multaj konvinkitaj volapukistoj definitive forlasis la lingvon de Schleyer por tiu de la rusa doktoro.

"Ni havas sufiĉe da tempo, kiel vi povas supozi, por longe pritrakti Esperanton ; ĉiu kiu ŝatus en, kelkaj horoj lerni novan lingvon, akiru la *Manuel avec double dictionnaire* ĉe S-ro René Lemaire, place Masson, en Epernay, Francio. Tiu libreto, kiu kostas nur 50 cendojn – 65 cendojn inkluzive la sendkostojn – enhavas ĉiujn necesajn klarigojn pri la origino de Esperanto kaj ĝia progreso, kaj liston de ĉiuj verkoj tradukitaj en Esperanton. Ĝi ebligas al ĉiu kiu volas oferti kelkajn horojn al atenta legado, rapide lerni la novan lingvon.

"Ni aldonu, ke S-ro Lemaire, kiu iĝis la sindona ĉampiono de Esperanto, estas afabla lingvisto, kiu ĉiam pretas rebati la kontraŭargumentojn, kiujn oni volas diskuti kun li.

"Ni intencas baldaŭ reveni al tiu temo kaj iam publikigi la liston de la belgaj aliĝintoj al Esperanto." (Fino de la tradukita citaĵo)

Ni ne daŭrigis la esploron de pliaj jarkolektoj de tiu revuo, sed trovis ĝin citita ankoraŭ en priesperanta artikoleto en *L'Espérantiste*.

Cetere S-ro Armand Dethier estas verŝajne la unua belga esperantisto. Li aperas en la XVI-a Adresaro (kun la aliĝoj inter 1.10.1893 kaj 1.10.1895 sub la numero 3015 kiel "farmacisto el Lieĝo". Dato de lia esperantiĝo menciita estas 1892.

En 1898, en la unua jarkolekto de la revuo *L'Espérantiste* li estas menciita kiel verŝajna unua belga esperantisto. Ni citu : "Kiel diris la gazeto *Le Petit Bleu* en sia numero de la 13-a de februaro, la unua belga esperantisto, almenaŭ de ni konata, estis sinjoro Dethier, direktoro de *l'Annonce Timbrologique*. Lia ĵurnalo ĉiam estis, kun la plej plena komplezo, malfermita al nia lingvo. En ĝi diversdate eliris artikoletoj pri Esperanto, montrantaj kiel multe ĝi povas utili al la kolektantoj de poŝtmarkoj. Tiu ĉi speciala anaro ne estas malŝatinda de ni. La filatelistoj, tre enprenitaj en internaciaj rilatoj, estas ĉiumomente haltigataj de la diverslingva kontraŭaĵo. Ili estas do en pli bona situacio,



ol multaj aliaj, por kompreni la necesecon de lingvo internacia. Aliparte, en la sekvo mem de siaj rilatoj kun multaj fremdaj landoj, ili povas fari tre vastan propagandon por ni." (*L'Espérantiste*, 1898, I/2, feb.98 – p. 18, 19).

Li certe estis aktiva ankoraŭ poste, ĉar en *L'Espérantiste*, I/4, aprilo 1898, ni legas :

"S-ro Dethier el Bruselo komunikas al ni la filatelistan ĵurnalon *Le Timbrophile Gaulois* (en Marzéville-lez-Nancy), en kiu esperantisto antaŭe nekonata de ni, S-ro Alberto d'Argent, membro de la poliglota klubo de Bruselo, montras la grandegajn servojn, kiujn Esperanto povas fari, kaj li proponas sin sendi propagandan broŝuron al ĉiuj kiuj petas ĝin. (*L'Espérantiste*, I/4, p. 40-a).

Tamen ni ne trovis lin en la listo de la membroj de SppE. Ni rimarku ankaŭ, ke la citita urbo nun estas Bruselo, kiel ankaŭ poste en *La Belga Sonorilo*.

Eriko D'Hondt kaj Petro De Smedt

Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Francio – *Esperanto dum la EU-elektoj* –

Multaj amaskomunikiloj raportis, ĝenerale tre mallonge, pri la listo EDE (Europe – Démocratie – Espéranto).

Eĉ Laurent Ruquier en sia humura-distra radioelsendo *On va s' gêner* (Oni ĝeniĝos) ĉe Europe 1, montriĝis scivolema pri la listo.

Pro la limigitaj financaj rimedoj de EDE, verŝajne multaj civitanoj ne ricevis perpoŝte voĉdonilon aŭ ne trovis ĝin en la voĉdonejo (eble tamen temis pri malgranda kvanto kaj nur frumatene). En kazo de dubo estis eble printi mem voĉdonilon, kiu estis ankaŭ elŝutebla. Tio estis interesa alternativo por sindeteno aŭ "blanka" nula voĉdono por esprimi sian

malaprobom pri la politiko de la hegemoniaj partioj, kies hegemonio estas ligita al ne ĉiam klara financa situacio.

Pierre Dieumeregard, sekretario de EDE, publikigis la dokumenton "Déclaration anti-corruption" (antaŭkorupta deklaro) la 8-an de majo 2014. Li reliefigis la mankon de travi-debleco en la lukto kontraŭ koruptado kaj ankaŭ la mankon de klareco pro la uzo de tradukoj el la angla kiel referenca lingvo.

Henri Masson

Nepalo – Sukcesa Speciala Renkontiĝo –

La Speciala Renkontiĝo okazis de la 6-a ĝis la 17-a de marto 2014. Partoprenis la tutan programon entute 35 esperantistoj, kaj simila nombro nur parton. La partoprenantoj inkluzivis 17 alilandanojn, inter kiuj 5 el Belgio.

La ĉi-jara celo de la programo estis inviti esperantistojn de ĉiuj aĝgrupoj ĝui la mondfamajn lokojn de Nepalo kaj florigi la Esperanto-movadon en la mezokcidenta turisma urbo Pokhara.

La programo komenciĝis la 6-an de marto per akcepto de la gastoj. La speciala gastino el Belgio, s-rino Ilse Jacques solene malfermis la programon. Rezentantoj de la diversaj landgrupoj deziris sukceson al la Renkontiĝo. Ĉiuj gastoj admiris nepalajn historiaĵojn, naturon kaj kulturon. La dutaga ekskurso komenciĝis la 8-an de marto post du tagoj dediĉitaj al vizito de la katmandua valo. La ĉeestantojn ĝuis elefantrajdadon, boatadon kaj buntan kulturalan programon. La 10-an de marto la tuta grupo ekveturis al Lumbini, naskiĝloko de Budho, kaj la 11-an ni atingis la montaran urbon Papla, kiu famas pro siaj lokaj fabrikoj precipe de nepalaj ĉapoj (topi) kaj pro sia natura beleco. La 15-an la grupo atingis Katmanduon kaj partoprenis la geedziĝan feston de la filo de s-ro Parashar Rijl, konsilanto de Nespa.

Bharat K. Ghimire


Nederlando – La nova muzikbando Kapriol'! –

La frisa muzikbando Kapriol'! (Nederlando) estiĝis spontane dum balfolkaj vesperoj.

Antaŭe la muzikistoj jam ludis sur multaj festaj scenejoj. Marita kaj Maria ludis dum multaj jaroj en la Esperanto-grupo Kajto, kaj nun ili konsistigas la duon Marianta (flutoj, akordiono, kanto). Ad Kalis kaj Rutger Sjock jam abunde meritis siajn laŭrojn en la bandoj Blue Tape Band kaj 60/60.

Kun la nova grupo Kapriol'! ili kvarope prezentas svingan kaj varian programon kun

balfolkaj danĉmelodioj kaj kantoj, kiuj fontas el tradiciaj repertuaroj nederlandaj aŭ memfaritaj. Koncize dirite, ili ludas kaj malnovan muzikon per novaj muzikiloj, kaj memfaritan muzikon per malnovaj muzikiloj. Ĉion ĉi ili kombinas kun bela plurvoĉa kantado kaj plurkoloraj aranĝoj. Krom tio improvizado estas grava parto.



Balfolko signifas : festa balo kun tradicioj dancoj, kiuj jam estas ŝatataj dum multaj jarcentoj en la tuta Okcident-Eŭropo. Temas pri pardancoj kiel skotiŝo, polko, valso, mazurko, kaj vicdancoj kiel bureo aŭ andro. Estas ankaŭ rondancoj kiel cerklo kaj ĵigo, ĉe kiuj la partneroj daŭre interŝanĝiĝas. La grupo volonte montras la dancojn kaj povas doni danckurson por dancigi la publikon. Ne necesas multe da eksplikoj, ĉar la bazo de la balfolkdancoj estas sufiĉe simpla. Tamen la progresintaj dancantoj povas ĝisfunde ĝui la dancojn kun variaĵoj kaj subtilaĵoj.

Informoj: Marita Kruijswijk, Kerkstraat 32, NL 8433 LJ Haulerwijk, tel. +31-516421612
retadreso: marianta@xs4all.nl , retpaĝo: www.marianta.nl .

Marita Kruijswijk

La Sud-Polusa glacio fandiĝas

(Het Zuidpoolijs smelt weg)


Plialtiĝo de la marnivelo per pli ol unu metro : tio estas la malbonaŭgura prognozo de la sciencistoj, kiuj pristudis la malaperon de ses grandaj glaciejoj en okcidenta Antarktiko. Verŝajne la procezo estas neinvertigebla.

La rezultato de kvardek jaroj da esplorado montras, ke la ses glaciejoj, kiuj fluas en la Maron de Amundsen en okcidenta Antarktiko, sekve de la varmiĝo de la tero, atingis "a point

of no return", punkton de neinvertigleco. Tio estas la konkludo de teamo da esploristoj en Kalifornio

La fandiĝakvo de tiuj ses glaciejoj sufiĉas por plialtigi la nivelon de la marakvo per 1,2 m. La teamo sub gvido de profesoro Eric Rignot baziĝas sur la observoj fare de satelitoj, aviadiloj, ŝipoj kaj esplorado de la tiel nomata kontinenta glacio. Temas pri gigantaj kvantoj da glacio. La Maro de Amundsen estas tiel vasta kiel Francio. La malforta subventro de tiu sistemo estas la sektoro Pine Island (Insulo Pino), en kiun fluas la samnoma glaciejo, kiu havas 30 km da larĝo kaj 500 km da longo.

Teamo de la Universitato de Vaŝingtono en Seatlo ekzamenis la 'vivon' de unu specifa glaciejo, la tiel nomata glaciejo Twaites [tvejtis], kiu estis forte repuŝita de la maro dum la lastaj 18 jaroj. Tiu ĉi glaciejo, kiu nun ankoraŭ ripozas sur roka bazo, minacas rompiĝi kaj ŝovi en la maron. "Tiam ĝi tre rapide perdos glacieron," timas la projektgvidanto, Ian Joughin. Kvankam daŭros ankoraŭ kelkajn jarcentojn antaŭ ol la glaciejo estos komplete fandiĝinta, la sciencistoj nomas tiun evoluon tre zorgiga. La fandiĝo pli kaj pli rapidiĝos en la estonteco.



Sudpolusa glaciejo minacas fali en la maron

Kvankam la fandiĝo de tiuj glaciejoj ŝajnas natura procezo, la plivarmiĝo de la oceanoj ankoraŭ plirapidigas ĝin. La mizero ne limitiĝos per la okcidenta parto de la Suda Poluso, ankaŭ la orienta parto estas minacata. Tie troviĝas ankoraŭ pli da glacio, kaj sola la glaciejo Totten enhavas sufiĉe da glacio por, se ĝi tute fandiĝos, kaŭzi plialtigon de la marnivelo per sep metroj. Detala mapo de la evoluo de la glaciebenaĵoj sur la tuta Antarktiko estis desegnita de la sciencistoj de la Brita Centro de Polusobservoj en Modelling, kiu uzis la

*Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de*

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

mezuradojn de la satelito de la Eŭropa Spacagentejo, CryoSat-2. Ili konstatis, ke la glaciebenaĵo sur la tuta Antarktiko perdas ĉiujare 159 miliardojn da tunoj da glacio, kio estas la duoblo de la lastaj mezuradoj.

La nove mezuritaj perdoj sur Antarktiko solaj sufiĉas por plialtigi la marnivelon per 0,45 mm ĉiujare, granda plialtiĝo kompare kun antaŭaj mezuradoj. Inter 2010 kaj 2013 okcidenta Antarktiko, orienta Antarktiko kaj la antarktika duoninsulo perdis respektive 134, 3 kaj 23 miliardoj da tunoj da glacio ĉiujare.

"Kvankam ni ĝojas pri tio, ke helpe de la satelito CryoSat ni povas pli bone observi la polusajn glacikovraĵojn, ĉi tie temas pri tre zorgiga evoluo," diras Andrew Shepherd de la Universitato de Leeds, kiu kondukis la studon. "Estas nova pruvmaterialo, ke dramaj ŝanĝoj okazas sur tiu ĉi parto de nia planeto, kie troviĝas sufiĉe da glacio por plialtigi la marnivelon per unu metro."

RH/PS, HBVL

Kial la viroj ne aŭskultas kaj la virinoj ne parolas klaran lingvon.

(Waarom de mannen niet luisteren en de vrouwen geen klare taal spreken.)

Kial viro estas kia li estas ? Kial li ne parolas, apenaŭ aŭskultas kaj endormiĝas tuj post la amorado ? Sep kliŝoj kaj veroj pri la vira cerbo.

1-a kliŝo : Adolekantoj ofte pensas pri ssekso. Vero : Jes, estas tiel.

Dum la adoleskeco la nivelo de la testostero en la knaboj ĝis 20 jaroj plialtiĝas ĝis dudekfoje. La hipotalamo, la parto de nia cerbo kiu regas niaj seksajn dezirojn, pligrandiĝas

multe pli ĉe la knaboj ol ĉe la knabinoj. Alivorte testosterono svingiĝas tra ilia korpo. La aserto estas do parte ĝusta, sed tio ne signifas, ke la knaboj ĉiam pensas pri sekso kaj la knabinoj ne. Ne nur la hormonoj, sed ankaŭ la edukado kaj la ĉirkaŭaĵo determinas, kiel ofte oni pensas pri sekso, ĉu oni estas knabo aŭ knabino. Familio, amikoj kaj lernejo ankaŭ ludas gravan rolon. Ankaŭ post la juneco, la viroj estas ofte akuzataj pensi pli ofte pri sekso, ol virinoj. Ĉiun okan sekundon, se oni volas esti korekta, oni asertas. Ne estas klare, ĉu la viroj pensas pli ofte pri sekso ol la virinoj, sed ili spertas ĝin certe alimaniere. Se viro volas amori, li montras tion kaj provas amori. La virinoj same ofte deziras sekson, sed ili ne ĉiam entreprenas ion. Tio estas granda diferenco. Pro ilia pli alta nivelo de testosterone la viroj havas pli fortan seksan deziron, pro kio ili transiras pli rapide de la deziro al la ago. Sed memkompreneble viro estas multe pli ol nur siaj hormonoj.

2-a kliŝo : La viroj estas ekkoleremaj.

Vero : Ili montras sian koleron, la virinoj ne.

Aŭtovicoj sur la vojoj, komputilproblemoj, elekto de malĝusta kaso en ĉiovendejo : viroj kaj virinoj spertas ĉiutage la samajn frustraciojn. La diferenco inter la seksoj estas, ke la viroj fariĝas dudekfoje pli ofte agresivaj ol la virinoj. Pro sia alta titro de testosterono la viroj pli facile cedas al sia kolero kaj agresemo. Ĉe viroj estas tre simple: ili koleras kaj montras tion. Ili malpli kaŝas siajn frustraciojn ol la virinoj, kiuj kapablas pli bone kamufli siajn sentojn. La virinoj subpremas ilin, ĝis la bombo eksplodas, ofte je la granda surprizo de sia partnero, kiu rimarkis nenion de tiu kolero. La edzino kiu plendas pri tio, ke ŝia edzo ne vidas sian koleron, agas malbone. Estas klare, ke li ne vidas tion, ĉar la virinoj ne montras tion. Ili eble donas malgrandajn signojn, sed la viroj ne rimarkas ilin. Se virino koleras, ŝi ne kaŝludu kun la edzo, sed sincere diru tion al li, kiel faras viro. Tio estas malpli komplika.

3-a kliŝo : La viroj emas esti malfidelaj.

Vero : Sed ankaŭ same ofte la virinoj.

Ĉu malfideleco estas natura fenomeno ĉe la viroj ? Jes en la besta regno. Tie la maskloj estas programitaj por gravedigi kiel eble plej da femaloj. Por pli da klareco : ni ne estas bestoj, sed homoj. Ni sekvas nian instinkton, sed ni povas fari elekton. Viro kiu asertas, ke li ne ne kulpas pro tio, ke li estas malfidela,



metas sin sur la nivelo de simio, kiu havas la inteligentecon de dujara bebo. Ne pro tio ke ili estas barelo plena je hormonoj, la viroj nepre estus malfidelaj. Estas tiom da malfidelaj virinoj kiom da viroj. Kun kiuj alie tiuj viroj kopulus ? Tio dependas ankaŭ de tio, kion oni komprenas per malfideleco. Ĉu paroli kun alia viro dum horoj kaj tagoj tra la intereto kaj tiel havi kun li intiman rilaton sen korpa kontakto, ĉu tio estas malpli grave ol dividi kun li liton pro nura sekso ? Estas malfacile meti en tion la ĝustan limon. Aŭstralia terapeŭto iam diris : "La virinoj bezonas kialon, la viroj okazon." Per tio li volis diri, ke virinoj plie serĉas kialon por esti malfidela, ekzemple kiam ili sentis sin neglektataj aŭ nekompenataj aŭ malhoneste traktataj en sia rilato. Kontraŭe la viroj ne bezonas kialon por trompi sian partnerinon. Kvankam ili havas bonegan rilaton kaj sekson, ili tamen ofte estas malfidelaj.

4-a kliŝo : La viroj volas nur dormi post amorado. Vero : Ili nepre devas dormi.

Sekskontakto malstreĉas ambaŭ gepartnerojn. Dum la seksumado liberiĝas oksitohino, la tiel nomata hormono de amo. Ĝia efekto estas, ke oni sentas sin tiam tute malstreĉa kaj feliĉa. Nur virinon ĝi metas en karesman situacion. Ĉe viro ĝi efikas kiel dormiga polvo. En la sesdekaj jaroj de la antaŭa jarcento du usonaj seksologoj, Willam Masters kaj Virginia Johnsons, faris testojn. La rezultato estis, ke la virinoj bozonas pli da tempo por ekscitiĝi kaj ankaŭ por malekscitiĝi. La viroj ekscitiĝas pli rapide, sed ilia ekscitiĝo ankaŭ pli rapide malaperas. Tio perfekte klarigas, kial kelkajn sekundojn post la amorado ili jam ronkas. Orgasmo donas al la virino fortan puŝon,

dum ĝi kontraŭe lacigas la viron. Se virino deziras ankoraŭ iomete paroli kaj karesi, ŝi devas tuj agi post la seksumado. Aŭ amori matene anstataŭ malfrue vespere.

5-a kliŝo : La viroj ne aŭskultas.

Vero : Verfakte ili jam faris pluan paŝon.

En nia cerbo ni havas du sistemojn, kiuj respondecas pri nia sento de empatio. Se ni vidas, ke iu suferas, certaj regionoj en nia cerbo estas ekscititaj, kvazaŭ ni mem suferus. Tio faras, ke ni povas translokiĝi en la emociojn de aliaj personoj. Ĉe la viroj tio ne daŭras tre longe. Dum virino ankoraŭ plu sentas kompaton, la cerbo de la viro jam estas analizanta, kiel li povos praktike solvi tiun problemon. Se tiu devio ne plaĉas al la virino, ŝi povas peti lin ankoraŭ ne serĉi solvon, sed aŭskulti kaj montri kunsenton. Tio bone funkcias. La fakto ke la virino mencias tion antaŭe, demonstras ke li jes povas aŭskulti. Tiel simpla povas esti la vira cerbo.

6-a kliŝo : La viroj estas sensentaj.

Vero : Ili ne montras siajn sentojn.

Konversacio: "Kia estis via tago?" - "Bona." - "Pri kio vi pensas?" - "Pri nenio."

La viroj ne estas parolemaj. Ili estis tiel trejnataj. Efika komunikado jam estis grava por la pratempa ĉasisto. Knaboj devas esti fortaj kaj kuraĝaj kaj ne rajtas plori. Tio sinrego havas ankaŭ sian biologian kialon. Ĉe la virinoj la lingvocentro troviĝas tuj apud la emocioncentro. Tial ili povas pli facile esprimi, kion ili sentas. La viroj havas alian "drataron" en sia kapo, kiu faras ilin parole malpli fortaj. Ili povas malpli bone vortigi, kio okazas en ilia kapo. Sed tio ne signifas, ke ili estas sensentaj. Cetere tio ankaŭ ne estas tipe vira problemo. Ankaŭ multaj virinoj ne povas facile vortigi siajn sentojn, kaj restas senaj dum tutaj tagoj, dum estas la viroj kiuj parolas. Precipe la juna generacio de la viroj, la dudek- kaj tridekuloj, ĉiam pliboniĝas en tiu rilato. Ni sentas nin pli bone, post kiam ni malŝarĝis nian koron. Sed paroli ne estas bona solvo por ĉiuj. Por iuj viroj pli taŭgas unu horo da sporto ol bona konversacio por malpezigi sian koron.

7-a kliŝo : Maljuniĝante, la viro fariĝas pli trankvila. Vero : Li fariĝas pli virineca.

Dum post la menopaŭzo virinoj produktas malpli da virinajn hormonojn kaj do fariĝas iomete pli virecaj, ĉe la viroj okazas la kontraŭa evoluo. Ilia nivelo de testosterono

plimalaltiĝas, tiel ke la rilato inter viraj kaj virinaj hormonoj ekvilibriĝas. Ju pli viro maljuniĝas, des pli li fariĝas milda kaj emocia. Li parolas kaj aŭskultas pli facile, eĉ povas plori, sed pli malbone eltenas alkoholon. Eble li finfine fariĝos ŝia plej bona amik(in)o !


Lien Lamar

Prof. Rudi Westendorp kaj maljuneco (Prof. Rudi Westendorp en de ouderdom)

"Ĉiuj homoj timas maljuniĝi. Sed kiam oni demandas gemaljunulojn pri ilia vivo, aperas ke ili estas ĝenerale tre feliĉaj," diras Rudi Westendorp (54-jara), profesoro pri geriatrico en la Universitato de Lejdeno (Nederlando). En sia libro *Maljuniĝi sen esti maljuna* li renversas unu post la alia la rustfiksiĝintajn ideojn pri maljuneco kaj griziĝado. Li donas tute novan rigardon pri maljuneco per dek rimarkindaj tezoj en sia libro *Se vi multe amoras, vi vivos pli mallonge*.

1. Unu el la nunaj novnaskiĝintoj certe atingos la aĝon de 135 jarojn .

Laŭ Rudi Westendorp okazas io kiel ĉe la sportkonkursoj. Ĉu temas pri glitkurado, naĝado aŭ vetbiklado : kun la tempo oni moviĝas ĉiam pli rapide. Se vi ririgardas la rekordojn establitan dum via juneco, vi povas nur ridi, kvankam vi tiam kredis, ke ne estas eble pli rapide glitkuri, naĝi kaj bicikli.



Prof. Rudi Westendorp

Dum la lastaj cent jaroj la averaĝa vivatendo plialtiĝis de kvardek al okdek jaroj, kaj li ne konas kialon, pro kiu tiu evoluo iam finiĝos. Sekve oni rajtas konkludi, ke la knabinoj, naskiĝintaj ĉirkaŭ 2000 en Belgio aŭ Nederlando, atingos la averaĝan aĝon de 100 jaroj. La samo validas por knaboj kiu naskiĝas hodiaŭ. Kompreneble ne ĉiuj havos 100 jarojn. La granda mortado komenciĝos ekde la aĝo de 60 jaroj, sed la esceptoj havos 130 jarojn aŭ pli. Tio eĉ estas singarda takso : ankaŭ 140 jaroj eblis.

2. Optimismaj sciencistoj konkludas, ke la unua homo kiu atingos la aĝon de 1000 jaroj, nun jam naskiĝis, almenaŭ se ni povos antaŭi damaĝon en nia korpo, riparante kaj anstataŭigante ĉelojn kaj organojn.

Ne ekzistas maksimuma aĝo. Senfina vivo estas ebla en teorio, sed ni neniam fariĝos senmortaj, ĉar ĉiam minacas nin la risko trafi sub tramon aŭ havi alian akcidenton.

Maljuniĝo estas la ekvilibro inter damaĝo kaj riparo. Se oni povas ripari la damaĝon, la problemo estas solvita, kaj se vi anstataŭigas ĉiujn partojn de via aŭto, ĝi estas kvazaŭ nova. La samon ni faras per nia korpo, ekzemple kiam oni metas plastajn lensojn en niajn okulojn aŭ rekreskigas mortintan hepaton, kion ni jam nun. kapablas fari Rilate al kruro aŭ falango la problemo estas pli komplika, sed ankaŭ pri tio la blastoĉelbiologoj jam okupiĝas. Ĉu tio estas sciencfikcio ? Kio pri la salamandro ? Ĝia vosto ankaŭ rekreskas, se ĝi perdis ĝin. Sed kiel longe ankoraŭ daŭros, antaŭ ol ni sukcesos fari tion, ni ne scias. Antaŭdirita tion estas malfacila

3. Kiu havas multajn infanojn, vivas pli mallonge. Tio estas ofta fenomeno ĉe la bestoj. La musoj oftege seksumadas, havas multegajn posteulojn kaj vivas mallonge. Ni relative malofte seksumas kaj vivas longe. Se oni investas en generado kaj edukado, oni faras tion koste de la prizorgado de sia korpo. Ĉu oni do vivas pli mallonge, se oni ofte seksumas ? La respondo estas jes : oni riskas ricevi sekse transdoneblajn afekciojn, la knaboj trinkas tro multe da alkoholo kaj veturas tro rapide pro sia multa testosterono, kaj virinoj mortas dum akuŝo. Tio estas la rektaj kostoj de seksumado. Hodiaŭ la riskoj estas pli malgrandaj ol antaŭe, sed se oni rigardas la mortnombrojn, oni konstata, precipe ĉe la knaboj, ankoraŭ ĉiam plialtiĝon ĉirkaŭ la dudeka vivjaro. Nenia scienca observo subtenas la kutiman aserton, ke oni vivos pli longe, se oni ofte seksumas.

4. Ĉio montras, ke en la estonteco multe malpli da homoj suferos pro demenceco ol nun. La finaĵo de la tunelo estas videbla. La sciencistoj jam ofte demonstris, ke la riskoj malplimultiĝas. Por tio estas akceptebla klarigo. La nunaj maljunuloj estis pli bone instruitaj, kaj ilia cerbo povis pli bone disvolviĝi ol antaŭe. Ankaŭ la fakto, ke ni mastris kor- kaj angimalsanojn, efikas pozitive. Se vi havas tro altan sangtension kiel mezaĝulo, la risko, ke vi demencos pli frue, estas du- aŭ trifoje pli granda. Necesas multe moviĝi kaj regule kontroli la sangtension. Uzi elektran biciklon estas do frenezaĵo. Oni devas laciĝi kaj ŝviti.

El HBVL

Neferteta, la bela egipta reĝino (1)

(Nefertete, de mooie Egyptische koningin (1))

La suba rakonto estas rekonstruaĵo de la vivo de la fama egipta reĝino, kiu baziĝas sur science pruvitaj faktoj kaj la t.n. leteroj de Amarno, kiujn interŝanĝis la egiptaj faraonoj Amenotepo la III-a kaj lia filo Aĥnaton de la XVIII-a egipta dinastio (1575-1308 a.K.), kun Tusrato, reĝo de Mitanio, reĝejo en Malgranda Azio apud Babilonio, la patro de Neferteta, kun kiu ili amike rilatis.

Por eviti bankroton Tusrato urĝe bezonis multan oron, kiu abundis en Egiptio, kaj tial prezentis al Amenotepo la III-a sian tre belan filinon Taduĉepan, petante lin pri oro. Finfine la faraono, kiu ne plu estis juna kaj ĉe tio malsana, akceptis la oferton, sed postulis, ke Tusrato unue sendu al li la knabinon, antaŭ ol rajti ricevi la oron. Tusrato sendis ŝin kun la kutimaj donacoj : ĉevaloj, veturiloj, armiloj, litoj, vazojn, vestaĵojn, ornamojn, juvelojn, vestokestojn ... Poste Tusrato ricevis la petitan oron. Tio ĉi okazis en 1366 a.K. Taduĉepa, kiu havis tiam nur 13 jarojn, ricevis en Egiptio la nomon Nefertetan.

1. Alveno de Neferteta en Tebo¹

Sur granda ŝtona tablo kuŝis ligita virbovo, prilumata de la klare brulantaj oleolampoj. Li furioze moviĝis por liberigi sin de la fortaj ŝnuroj, dum proksimiĝis al li la ĉefpastro, kiu havis oran diademon sur la kapo kaj estis akompanata de grupo da aliaj pastroj. La taŭro terure ekroris, kiam la ĉefpastro puŝis sian

¹ Tebo estis la greka nomo de la urbo ekde 356 a.K. La egipta nomo de Tebo estas Veset aŭ Net.

longan tranĉilon en lian kolon. Tuj la templo-servistoj, kiuj estis speciale trejnitaj por tiu tasko, ĉirkaŭis la sangantan beston kaj komencis buĉi ĝin.

Militistecaj sonoj de mantamburoj kaj knariloj akompanis tiun rituaron, dum la agrablaj odoroj de spicherboj miksiĝis kun la penetranta fetoro, disvastigata de la brulantaj intestoj de la virbovo.

Amenotepo la III-a seninterese sekvis tiun tremigan okazaĵon ekde sia ebena portseĝo. Nur post kiam la krurojn kaj grandaj pecoj da karno estis dehakitaj, li ekstaris. Du servistoj rapidis al la ŝanceliĝanta faraono por subteni lin.. Aliaj donis al li la pecojn de karno, kiujn li ĵetis en la oferaĵon.

Tiu estis la danko de la faraono al la Reganto de la Tronoj de la Du Landoj, Supra kaj Malsupra Egiptio : la ĉefdio Amono, kiu plenumis post ses jaroj da atendo lian plej karan deziron : ricevi kiel edzinon la junan mitanan principon kun la blanka haŭto, tiel bela kiel lia 'Granda Reĝa Edzino' Teja iam estis. Kaj nun finfine venis la momenton.

Skoltoj venis kaj komunikis al li, ke la reĝaj boatoj estis veturantaj almonte sur Nilo. Sur unu el ili troviĝis la bela mitana princino, Taduĉepa, la filino de reĝo Tusrato. Ĉe la sunsubiro la boatoj alboridiĝis en Tebo.

Nun ankaŭ la popolo venis de post la kolonoj de la templo de Karnako. Viroj kaj virinoj trempis siajn fingrojn en la sangoflakojn kaj signis per ĝi sian frunton. Tiu procezo estis plurfoje ripetata, ĉar sklavoj alkondukis plurajn aliajn virbovojn unu post la alia. Tiam ili alkondukis antilopojn kaj fine anserojn.

Templodancistoj kaj -dancistinoj, ankoraŭ preskaŭ infanoj, gracie plenumis rondancojn antaŭ la faraono, akompanate de monotone sonantaj ĥoraloj. Tiuj gedancistoj estis instruataj en specialaj lernejoj, kiuj apartenis al la templo. Kiam ili alvenis en tiu lernejo, la plej multaj havis ne pli ol ses jaroj.

La suno staris jam malalte super la sankta Valo de la Reĝoj, kiam ok fortaj servistoj portis la nigran portseĝon, sur kiu sidis la faraono, al la rivero Nilo, kie la blanka per oro garnita reĝa barko, 'Atono brilas', alboridiĝis ĉe la ruĝaj marmoraj ŝtupoj, kiuj malsupreniris ĝis la rivero. Sur estrado meze de la plej granda ŝipo staris speco da kaĝo, kovrita per blankaj travideblaj vualoj, en kiu oni povis vidi svagan silueton : principon Taduĉepan de Mitanio, kiu, tre ekscitita, aliris tiun tute novan, fremdan mondon.



Giganta statuo de Amenotepo la III-a kaj lia Granda Edzino Teja antaŭ templo en Karnako

Fremdulo, kiu kiel Neferteta surŝipe almonte veturis Nilon kaj unuafoje vidis tiun bizaran, buntan metropolon, devis esti kvazaŭ blindigita per ĝia brilego, pompo kaj oro. Ĝis la bordo de Nilo staris tie la vilaoj de la riĉuloj, konstruitaj pelmele, ĥaose unuj apud la aliaj, dominataj de la monumentaj konstruaĵoj por la dioj : temploj, obeliskoj kaj pilonoj².

Kaj tio ĉi estis vigligata per la krietaj voĉoj de la komercistoj, kiuj venis el la tuta lando kaj eĉ de malproksime ekster ĝi, ĉar nenie ruliĝis la mono kaj la oro pli facile ol en Tebo. En la haveno interpuŝiĝis la ŝipoj, kaj super la akvo resonis la ordonoj de la ĉefoj al siaj laboristoj, kiuj malŝarĝis ŝtonojn el Asuano, fruktojn el Sirio, vinon de la grekaj insuloj kaj buĉbrutaron el Malsupra Egiptio. Super la labirinto de stratoj kaj stratetoj ĉiam pendis laodoro de rostitaj fiŝoj kaj karno, sed ankaŭ la acida fetoro de fekaĵoj.

Ĉar mankis kloako. Nur la domoj de la riĉuloj ĉe Nilo ĵetis siajn malpuraĵojn en la riveron. Miriadoj da muŝoj ĉasadis ĉion varmsangan, kaj ĉe tio ankaŭ ili ne kompatis la faraonojn, eĉ ne la 'grandajn reĝajn edzinojn'.

Kiam la barko estis firme fiksita al la bordo, du servistinoj forigis la vualojn de la kaĝo, kaj tenera knabino, certe ne pli aĝa ol dektrijara, ekstaris de fotelo. En la fono aperis du junaj

² La pilonoj estis honoraj pordegoj apud la temploj. La urbo ne havis ĉirkaŭmurego nek pordegojn.

viroj, portantaj grandajn ventumilojn fari-tajn el enormaj plumoj, per kiuj ili protektis la vizaĝon de la bela princino kontraŭ la nun tre malalte falantaj radioj de la suno.

Kun mallevitaj okuloj, sed kun, por tiel juna knabino, nekutima memfido, Taduĉepa supreniris la ŝtuparon apud la bordo kaj paŝis al la teraso, kie Amenotepo la III-a atendis ŝin. Li estis forlasinta sian portseĝon kaj etendis siajn brakojn al ŝi. Taduĉepa iris al la faraono, kaj dum Amenotepo kliniĝis en ŝia direkto, ŝi leĝere levis la kapon, ĉe kio iliaj nazoj tuŝis sin – tio signifas : ili interŝanĝis egiptan kison. Ambaŭ diris ion, kion la alia ne komprenis, ĉiu en sia gepatra lingvo. La interpretistoj ankoraŭ ne intervenis, ĉar estis klare, per la ĝentilaj kapjesoj de ambaŭ, ke temis nur pri enkondukaj salutkortezaĵoj. Kiam la faraono turnis sin kaj prezentis la principeton al sia granda reĝa edzino Teja, la sceno havis ion preskaŭ amikecan.

Post la mallonga salutado Amenotepo, Taduĉepa kaj Teja sidiĝis en la reĝan barkon kaj veturis al la alia bordo de Nilo, kie troviĝis la nova palaco. Ilin sekvis du barkoj, en kiu troviĝis la servistinoj de Taduĉepa.

Ŝi certe estis imponita de la riĉeco kaj pompo de tiu ĉi plej granda kaj bela urbo sur la tero. Sed kion ŝi pensis, kiam ŝi vidis unuafoje tiun ĉi riĉegan, sed maljunan kaj malsanan reĝon ?

Lia grasa, lobeca supra korpoparto estis tute nuda, kaj ĉirkaŭ liaj dikaj koksoj li surhavis longan lumbotukon, kiu estis fiksita ĉirkaŭ lia talio per larĝa zono. Al la dorsparto de tiu zono estis fiksita leoparda vosto, kiu preskaŭ trenis sur la grundo. Kontraŭ la frunto li portis la brilan serpenton, la tiel nomatan uraeus (ureo), simbolo de lia potenco. La granda blua krono, kiun Amenotepo havis sur la kapo, verfakte estis nenio alia ol kapuĉo. Li preferis ĝin al la blanka krono de Supra Egiptio, al la ruĝa krono de Malsupra Egiptio, kaj eĉ al la duobla krono de ambaŭ landoj.

2. La riĉeco de la faraono

Sur la alia bordo de Nilo oni povis nun distingi la gigantan reĝan palacon. Kiam princino Taduĉepa unuafoje paŝis tra tiu palaco de Malkata, ŝi tretis sur plankon kiel sur spegulon, sur kiu estis pentrita lageto kun lotusoj kaj naĝantaj fiŝoj kaj anasoj. Inter kanoj kaj florantaj plantoj flugis travideblaj libeloj kaj buntaj birdoj. Sur la plafono de la palacsalono ŝi vidis lazurbluan ĉielon, tra kiu flugis kolomboj kaj

grandaj ruĝaj papilioj. Sur la vandoj brilis oro kaj plantformaj vitraj ornamaĵoj grandaj kiel domoj, kaj inter tiuj belaĵoj konstante ŝvebis la dolcaodoro de incenso kaj mirho.

Ĉi tie staris mebloj kaj ornamaj vazoj, kiajn Taduĉepa neniam vidis. Seĝoj kaj taburetoj havis longajn krurojn kaj estis tiel belformaj, ke la princino el Mitanio deziris sidiĝi momenton sur ilin, ĉar en ŝia hejmo oni konis nur sidejojn el masiva ŝtono. Ĉi tie oni vidis la plej belajn lignajn inkrustaĵojn. La pomad- kaj aromvazetoj, kiuj staris ĉie, ne estis faritaj el peza marmoro, sed el tajlita duone travidebla alabastro, kiu ebligis suspekti la enhavon. Belege prilaboritaj kestoj, sur kiuj oni vidis scenojn el la vivo de Amenotepo la III-a kaj lia Granda Reĝa Edzino Teja, kaj kiuj estis plenplenaj je ornamaĵoj kaj oraj uzobjektoj.

Tio do estis la palaco de la faraono ! Oni povas prave demandi sin, ĉu Taduĉepa ne estis pli imponita de la pompa beleco de tiu ĉi konstruaĵo ol de la aspekto de sia estonta edzo. Ekde multaj jarcentoj la giganta palaco de Malkata, nomita la ‘Domo de la Festĝoj’, tute malaperis de la tero, eĉ ĝiaj fundamentoj estas netroveblaj.

Ĉar estis la kutimo en la antikva Egiptio konstrui templojn kaj palacojn el daŭraj ŝtonblokoj, la fiero Amenotepo elektis tute alian konstrumaterialon, kiu kostis multe pli, nome lignon. Ankaŭ antaŭ tri mil jaroj ligno estis ekstreme multekosta en Egiptio. Amenotepo importis cedrojn el Libano. Nur la eksternaj muroj, la plankoj kaj la kolonoj de la tegmento estis el ŝtono. Internaj vandoj, tegmentoj, ŝtuparoj kaj balustradoj estis el ligno.

Tiu leĝera, gaja strukturo tute akordis kun la vivstilo de la faraono: li konstruis por si mem, kaj ne por la eterneco. Ligno multe pli suferis ol ŝtono pro la influoj de la vetero, kaj la fortaj fundamentoj estis reuzitaj de siaj sukcedintoj por iliaj propraj konstruaĵoj.

Ne pli bona sorto estis rezervita al la mortotemplo de la faraono, kiun li konstruis kilometron pli norden de sia palaco. La templo estis konstruita el blanka sabloŝtono kaj kovrita per oraj platoj. Ĝi estis ligita al la palaco per pompa aleo. La plankoj de la templo estis kovritaj per arĝentaj platoj, la tegmentoj per elektrono. Grandnombraj statuoj de la reĝo, ‘pli altaj ol la ĉielo’, kaj koncerne ilia beleco, ‘pli belaj ol la sundisko’ ĉirkaŭis la templon. Sed hodiaŭ oni trovas plu nenian spuron de tiu mondmiraĵo

(Daŭrigota)

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Historio de Esperanto en Belgio (1) (*E. D’Hondt kaj P. De Smedt*)
- Paĝo 3: Novaĵoj el Esperantolando:
- Francio : Esperanto dum la EU-elektoj (*Henri Masson*)
- Paĝo 4: - Nepalo: Sukcesa Speciala Renkontiĝo (*Bharat K. Ghimire*)
- Nederlando : La nova Muzikbando Kapriol ! (*Marita Kruijswijk*)
- Paĝo 5: La sudpolusa glacio fandiĝas (*RH/PS, HBVL*)
Kial la viroj ne aŭskultas... (*Lien Lamar*)
- Paĝo 7: Prof. Rudi Westendorp kaj maljuneco (*HBVL*)
- Paĝo 8: Neferteta, la bela egipta reĝino (1) (*Philipp Vandenberg*)
-

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatica heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.